

## ANĜELOJ

La vorto 'anĝelo' signifas 'senditon', 'anoncanton' aŭ 'peranton'. En la originalaj hebrea kaj greka lingvoj de la Biblio oni uzis tiun vorton egale pri ordinaraj homoj kaj pri la spiritaj anĝeloj de Dio:

*"Izebel sendis senditon al Elija ... "* (1Reĝ.19:2)

*"Kiam la senditoj de Johano foriris ... "* (Lk.7:24)

*"... anĝelo de la Eternulo vokis al Abraham el la ĉielo ... "* (Gen.22:15)

*"... aperis antaŭ li anĝelo de la Eternulo ..."* (Lk.1:11)

En tiuj citaĵoj la vortoj estas la samaj, kaj por decidi ĉu iu citaĵo temas pri homa sendito aŭ pri anĝelo de Dio oni devas atenti la ĉirkaŭtekston.

La tradukantoj de la Biblio plejparte ĝuste faris tiun decidon sed ne ĉiuokaze. Ekzemple Jesuo citis el Malaĥi 3:1 *"Jen Mi sendos mian anĝelon ..."* (Mt.11:10) kaj diris, ke tio temas pri Johano la Baptisto, kiu estis homo. En la Esperanta Biblio la tradukantoj de la Nova Testamento sekvis la Zamenhofan tradukon de la Malnova Testamento, nome 'anĝelo', sed pro tio, ke temas pri Johano, ĝi devas esti 'sendito'. Kontraŭe en Heb. 1:7, en citaĵo el Psalmo 104:4, kiam temas pri anĝeloj, la vorto uzita estas 'sendito': *"... pri la anĝeloj Li diras: kiu faras la ventojn Liaj senditoj ..."* Sendube troviĝas pluaj ekzemploj en la nacilingvaj Biblioj. (Estas notinde, ke la nomo Malaĥi devenas de la hebrea vorto 'anĝelo'/'sendito'.)

Gravas kompreni ankaŭ, ke la 'spiritaj' anĝeloj ne estas senkorpaj fantomoj; ili havas 'spiritajn' korpojn, similajn al tiu de Jesuo post lia releviĝo. Kvankam Paŭlo skribas, ke la releviĝinta korpo estas 'laŭspirita' (1Kor.15:44), tamen Jesuo post sia releviĝo estis reala kaj palpebla. Li diris al siaj disĉiploj *"... palpu min kaj vidu; ĉar spirito ne havas karnon kaj ostojn, kiel vi vidas min havanta."* (Lk.24:37-39) Estas evidente, ke per 'spirito' Jesuo aludis al io senkorpa, fantomeca. Tia estas nek li, nek la anĝeloj; kaj la esprimo 'laŭspirita korpo' kiun Paŭlo uzis fakte rilatas ne al fantomeco sed al supera speco de estaĵo, taŭga por eterna vivo kaj intima asocio kun Dio mem.

*"Ĉar estas necese, ke ĉi tiu putrema surmetu senputrecon, kaj ke ĉi tiu mortema surmetu senmortecon"* (1Kor.15:53)

\*\*\*\*\*

Jesuo diris, ke la anĝeloj estas multnombraj, senmortaj estaĵoj en la ĉielo, kiuj ne edziĝas:

*"... tiuj (la relevitoj) nek edziĝas nek edziniĝas; ĉar ili ne plu povas morti; ĉar ili estas egalaj kun la anĝeloj ..."* (Lk.20:35-36)

*"... anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas la vizaĝon de mia Patro"* (Mt.18:10)

*"Ĉu vi do supozas, ke mi ne povas alvoki mian Patron, kaj Li tuj liveros al mi pli ol dek du legiojn da anĝeloj?"* (Mt.26:53)

Jesuo diris ankaŭ, ke ili ne scias ĉion:

*"... pri tiu tago ... scias neniu, eĉ ne la anĝeloj en la ĉielo ..."* (Mt.24:36)

Anĝeloj estas spiritoj, kiuj ĉiam faras la volon de Dio:

*"Ĉu ne estas ili ĉiuj spiritoj servantaj, elsendataj, por servi al tiuj, kiuj estas heredontoj de la savo?" (Heb.1:14)*

*"...Liaj anĝeloj ... kiuj plemumas Lian vorton." (Ps.103:20)*

Estas evidente do, ke la anĝeloj ne povas peki. Kiam oni legas pri 'anĝeloj' kiuj pekis (ekz. 2Pet.2:4), tio temas pri homoj, mortemaj senditoj.

Plejofte anĝeloj estas nevideblaj al la homoj:

*"Anĝelo de la Eternulo postenas ĉirkaŭ tiuj, kiuj Lin timas" (Ps.34:7)*

Per ili Dio agis kaj parolis al homoj. Kiam ni legas en la Biblio, ke Dio aperis al iu homo, tio temas ne pri la Eternulo mem, sed pri anĝelo, ĉar neniu iam vidis nek povas vidi Dion:

*"Neniu iam vidis Dion ..." (Jn.1:18)*

*"... kiun neniu vidis nek povas vidi..." (1Tim.6:16)*

*"Dion neniu iam vidis ..." (1Jn.4:12)*

La anĝeloj povas aspekti kiel viroj, blanke vestitaj kaj brilante (ekz. Mt.28:3), sed kelkfoje ili aspektis kiel ordinaraj viroj. La tri 'viroj' kiuj aperis al Abraham fakte estis anĝeloj, unu el ili priskribita kiel 'la Eternulo':

*"... aperis al li la Eternulo ... jen tri viroj staris antaŭ li ..." (Gen.18:1-2)*

*"... leviĝis de tie la viroj ... kaj la Eternulo diris ..." (v. 16-17)*

Tiu anĝelo priskribita kiel 'la Eternulo' restis kun Abraham por sciigi lin pri la intenco de Dio detruiri Sodomon, dum la du aliaj iris al Sodom por fari tiun detruon:

*"... la viroj turniĝis ... kaj iris al Sodom; kaj Abraham staris ankoraŭ antaŭ la Eternulo ..."*  
(v.22-23)

*"Kaj la du anĝeloj venis Sodomon vespere ..." (19:1)*

Ni lernas la saman de la okazo, kiam Jakob luktis kun anĝelo. Li diris, ke li *"vidis Dion vizaĝon kontraŭ vizaĝo"* (Gen.32:30) sed fakte tiu estis anĝelo: *"Li luktis kun anĝelo kaj venkis ..."* (Hoŝ.12:4). Poste Jakob diris *"Dio, kiu paŝtis min de mia naskiĝo ... la anĝelo, kiu savis min ..."* (Gen.48:15-16)

Kiam Moseo vidis la anĝelon en la brulanta arbetaĵo estis Dio, kiu vokis al li:

*"... aperis al li anĝelo de la Eternulo en flama fajro ... la Eternulo vidis ... kaj Dio vokis al li el la mezo de la arbetaĵo ..." (El.3:2,4)*

*"... anĝelo aperis al li .. en flama fajro ... venis al li la voĉo de la Eternulo: Mi estas la Dio de viaj patroj ..." (Ag.7:30-32)*

Dio mem diris al Moseo, ke unu anĝelo portas Lian nomon kaj parolas per Lia voĉo:

*"Jen Mi sendas anĝelon antaŭ vi. Gardu vin antaŭ lia vizaĝo kaj aŭskultu lian voĉon ... ĉar Mia nomo estas en Li." (El.23:20-23)*

Kiam anĝelo aperis al la edzino de Manoah por sciigi ŝin, ke ŝi naskos Ŝimŝonon, ŝi priskribis lin jene:

*"... Dia homo ... lia aspekto estis kiel ... anĝelo de Dio, tre respektinda ..." (Juĝ.13:3,6)*

sed Manoaĥ ne konvinkiĝis, ke fakte estas anĝelo ĝis li vidis lin leviĝante en la fajro (v.20-21).

Per anĝeloj Dio venigas punon al homoj:

*"... eliris anĝelo de la Eternulo kaj frapis en la tendaro de la Asirianoj cent okdek kvin mil ... ili ĉiuj estis kadavroj servivaj."* (2Reĝ.19:35)

*"... anĝelo de la Eternulo tuj frapis lin (Herodon) ... kaj ... li senspiriĝis."* (Ag.12:23)

Kiam do ni legas pri 'malbonaj anĝeloj' (Ps.78:49) tio signifas, ke tiuj anĝeloj venigis malbonon al homoj, ne ke la anĝeloj mem estas malbonaj.

Per anĝeloj Dio kreis la mondon. Tial kiam Li diris *"Ni kreu homon laŭ Nia bildo"* (Gen.1:26) Li parolis al la anĝeloj.

### **Filoj de Dio**

Kvankam Dio unu fojon nomis la anĝelojn 'Filoj de Dio' (Ijob 38:7) tiu esprimo ordinare signifas la kredantojn, anojn de la eklezio:

*"... al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio."* (Jn.1:12)

*"... por ke vi estu senkulpaj kaj simplaj, filoj de Dio ..."* (Filip.2:15)

*"... nun ni estas nomataj infanoj de Dio, kaj tiaj ni estas. ..."* (1Jn.3:1)

Konsatinte tion ni povas ĝuste kompreni Genezon 6:4 *"... la filoj de Dio venis al la filinoj de la homoj ..."*. Klare tio signifas, ke kredantoj edziĝis kun nekredantoj, ne kun anĝeloj. Bedaŭrinde kelkaj nacilingvaj Biblio mis-tradukas la esprimon per la vortoj 'anĝeloj' aŭ 'senmortuloj', kiu tute ne validas kaj kaŭzas miskomprenon.

### **Sanktuloj**

Ekzistas multe da miskompreno pri tiu vorto. En la Biblio ĝi signifas homojn apartigantajn kaj temas ĉiam pri la kredantoj:

*"... al ĉiuj, kiuj estas en Romo, amataj de Dio, vokitaj sanktuloj ..."* (Rom.1:7)

*"... al tiu eklezio de Dio, kiu estas en Korinto, al tiuj, kiuj estas sanktigataj en Kristo Jesuo, vokitaj por esti sanktuloj ..."* (1Kor.1:2)

*"Ĉiuj sanktuloj vin salutas, precipe tiuj, kiuj estas el la domaro de Cezaro."* (Filip.4:22)

\*\*\*\*\*

Kiam venis Jesuo li, kiel la anĝeloj, parolis la vortojn de Dio kaj montris Lian gloron. Tamen li estas homo, ne anĝelo, sed pro lia volonta submetiĝo al la volo de Dio eĉ ĝis la morto, Dio faris lin pli alta ol la anĝeloj:

*"Dio, kiu multfoje kaj multmaniere parolis en la tempo antikva al niaj patroj en la profetoj, en tiuj lastaj tagoj parolis al ni en Filo ... kiu, estante la elbrilo de Lia gloro ... sidiĝis dekstre de la Majesto en altaĵoj; fariĝinte tiom pli granda ol la anĝeloj, kiom pli bonegan nomon ol ili li heredis."* (Heb.1:1-4)